

3-2-1976

Kara Sinjoro Dencöel,

Mi estis ĵus finskribinte leteron al S-ino Haupehthel (kopioj aldonitaj) kiam alvenis la via.

Ni volonte venus laŭ via invito; je dato laŭ via prefero. En Antverpeno mi nun montris diapozitivojn pri Angkor, Bangkok, Nepal. Novajn el 1975 mi havas de Skotlando kaj Sicilio. El la antaŭa periodo mi povas prezenti seriojn el Meksikio, Irano, Egiptio, Hindio, USA. Kanado, Izraelo, Turkio, k.t.p. Indiku vian preferon. Mi ne plu scias kion mi jam montris ĉe vi.

Rilate Esperanto:

Kamarado laboranta en Bruselo, en 1923, kunportis alportis ekzemplerojn de "Esperanto Triumfonta" ankoraŭ nun en mia posedo. Mi ne plu scias se mi akiris lernolibron per de li, aŭ aliloke; ĉiukaze estis memstudado. Iam (sed kiam?) mi abonis al Sennaciulo. Por pliperfektigi, mi enskribiĝis ĉe Van Aelst, por koresponda kurso.

Propagandante inter amikoj, mi sukcesis varbi aron da adeptoj, inter kiuj gvidanto de asocio de katolikaj skoltoj, kie mi riskis unuafoje (en 1926) organizi kurson.

-Dum tiu jaro 1926, kun kelkaj entusiamuloj, estis decidite fondi klubon, de kiu la regularo estis aprobita la 5-1-1928. Dum la tuta jaro 1927 ni propagandis en amikara rondo (sen statutoj) sed tamen posedante jam flagon!

Inter miaj paperaĵoj mi retrovis leteron de 2-11-1927, per kiu la ĉefdelegito Schoofs atestas la ricevon de mia aliĝo al UEA.

-Grandskala kurso komencis la 28-3-28, post intensa gazetara propagando, en granda salono de la urbo-domo, al kiu sin prezentis pli ol 200 personoj.... Estis certgrade katastrofo.... Mankis sidlokoj, mankis lernolibroj, mankis profesoroj sufiĉe spertaj.... Tiel devis okazi 2 sinsekvaj kursoj, kiujn gvidis malnova esperantisto el la antaŭmilita periodo, kaj mi mem. -Kaj ekde de tiam Esperanto fosis sian sulkon en Kortrejko.

-En Heroldo de 9-7-1926 mi retrovis jenan anonceton:
S-ro Gerard Debrouwere, 18 Aelbekensteeweg, Kortrijk, Belgujo, interŝanĝas P.I. (bfl). Korespondaĵoj el tiu periodo mi ankoraŭ posedas. Jen almenaŭ atestilo ke jam en 1926 mi estis esperantisto....

En Heroldo mi legis pri la feliĉa naskiĝo de filineto ĉe Serge. Gratulojn al la gepatroj kaj al la geavoj!

Tiel finas mia rapida kaj ne-antaŭpreparita letero. Do, ne priatentu la stilon.

Sincere via,